

ESPERANTO

sub la suda kruco

junio 2021





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 28[2] numero 142 junio 2021

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA - ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: www.esperanto.org.au / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn trudojn (ekz. per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15a de aŭgusto 2021

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright @ 2021 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087.

SUR LA KOVRILO: Suno tra la arboj apud la Montpasejo de Rienit, ĉe Monto Viktoria (fotita de Helen Webb) – vidu paĝon 20

ENHAVO

Kiu estas?	04
Owen William Loneragan (1924-2021)	05
Stonehenge en Nov-Zelando	06
Stonehenge en Aŭstralio	07
Matematikisto pensas pri Dio	10
Malriĉeco en riĉa lando	13
Daniel Kane 1948–2021	14
Leteramikoj	18
Monto Viktoria kaj HG Rienits	20
Kie vi estas?	21
Ĉu manĝi algojn?	23
Aŭstralia Hibrida Kongreso	28

Kiam vi ricevos ĉi tion la 2a virtuala UK de UEA estos finita. Do la dua jaro de virtualoj eventoj jam progresas. AEA ankoraŭ planas la kongreson kaj kursaron por Januaro 2022. Pro la daŭra necerteco pri la okazigo de realaj eventoj, enketoj pri kongresejo en Sidnejo ĉesis. La estraro planas hibridan kongreson/kursaron. La reala parto okazos en Esperanto-Domo en Sidnejo se kondiĉoj permesos. Ne estos loĝloko ĉe la kongresejo sed estos ebleco lui loĝlokon oportunan al Esperanto-Domo en Redfern. Ĉar Esperanto-Domo estas tre proksima al la fervojo, fakte estas multaj lokoj laŭ tiu vojo, kiuj estas malpli ol duonhoro for. Do espereble en Januaro grupo povos ĉeesti la eventon en Esperanto-Domo.

Ni ankoraŭ klopodas eldoni ĉi tiun gazeton. En la lastaj monatoj evidentiĝis kiom da laboro estas necesa por ordigi la artikolojn kaj fotojn en akcepteblan formaton por la presisto. Joanne Johns, antaŭa redaktoro, gvidis grupon per Zoom por informi ilin pri tia laboro kaj iom instrui la proceon. Pro tio, la estraro nun pli bone komprenas la tempon necesan por pretigi la gazeton. Do ĝi ankoraŭ daŭras danke al Joanne kaj ĉi-foje Jonathan Cooper, kiu faris la laboron por ĉi tiu numero.

Inter la limigoj pri vojaĝado en mia ŝtato mi sukcesis iri al la Blua Montaro okcidente de Sidnejo. Tie mi trovis ligon al unu el la pioniroj de Esperanto en Aŭstralio, S-ro HG Rienits. Pri li vi povas legi en la gazeto. Multajn dankojn al la kontribuantoj de artikoloj por la nuna eldono kaj al ĉiuj daŭre sendu pli.

Kiu estas?

KVIZO DE TREVOR STEELE (ADELAJDO)

1 Li devis fuĝi el sia balkana lando, kaj trovis postenon en londona universitato. Konata oratoro, li estis tre influhava en la Movado, kvankam li fine ekŝiĝis el UEA.

2 Iama esperantisto, li tamen kunlaboris kun de Beaufront por lanĉi rivalan lingvon.

3 Blinda ruso, kiu tamen vojaĝis al multaj landoj kaj lernis multajn lingvojn, verkis en Esperanto.

4 Li formulis la regulojn por vortkonstruado en Esperanto, inkluzive la regulo pri sufiĉo kaj neceso. Liajn teoriojn oni poste aplikis al naciaj lingvoj. Svisoj, li estis profesoro kaj frato de aliaj konataj intelektuloj.

5 Hungaro, militkaptito dum la Unua Mondmilito, poste inter la plej popularaj prozistoj kaj poetoj en Esperanto.

6 Japana diplomato ĉe la Ligo de Nacioj, neesperantisto, sed tre simpatia al la celoj

de Esperanto, provis instigi instruadon de Esperanto en lernejoj en la tuta mondo.

7 Anglo, oficisto de la brita kolonia servo en Egiptio, li pasigis siajn lastajn jarojn en Adelajdo. Bona prozisto kaj poeto, li mortis dum vizito al Parizo.

8 Anglino, iam estrino de pedagogia altlernejo, verkis en la angla kaj Esperanto, kaj ofte nomata la plej bona poetino en la internacia lingvo.

9 Hungarino nun loĝanta en Nederlando, naskita en 1957, ŝi tre aktivas sur eduka kampo, inkluzive kiel ano de ILEI.

10 La unua homo, post Zamenhof, kiu parolis esperante. Fama filino ŝia estis murdita en la nazia koncentrejo Treblinka. Ŝi mem mortis en 1924.

Respondoj sur paĝo 29

Owen William Loneragan (1924–2021)

VERA PAYNE (PERTO)

Ĉe lia funebra ceremonio ridetis al ni foto de bela junulo en aerarmea uniformo. Estis 1942 kiam 18 jara Owen rekrutiĝis en la aŭstralian armeon, kaj tre baldaŭ poste en la aerarmeon. Li estis sendita al Anglio, de kie, en 1945, li servis dum la 2-a Mondmilito kiel aerarmea radio-vidanto, fluganta super Eŭropo. Li travivis 26 tiajn misiojn, post kiuj, kiam feliĉe preta kaj atendanta hejmeniri, li trovis necese fari 16 pliajn. Do, entute, 42. Je la tago de la militofino, Owen estis la sola el sia misiono-kunularo, kiu ne supreniris en la aviadilo por lasta, ĝoja, akrobata flugo. Bedaŭrinde, oni ne replenis la brulaĵon tiun matenon, kredante, ke la aviadilo ne necesos; sekve, ĉiuj el la gekolegoj pereis. En foto de matura Owen, vidiĝas sur lia brusto 5 medaloj.

Geoff, filo, kun gefratoj Kerry (kiu estis dum pluraj jaroj la honora financo-reviziisto por la Esperanto Ligo de O.A.) kaj Larry, emocie panegiris sian patron, helpema, pasioplena, humila, memfida sed senpretenda, pragmata homo, kiu bone kaj plene plenumis sian vivon. Kiel diris Geoff, perdis la mondo noblan homon de paco.

Owen sentis la mankon de sia kara edzino Joan post ŝia morto antaŭ kelkaj jaroj; li tenis ŝin ĉe sia koro, ĉiam. Li estis fiera patro de la tri gefiloj, kiel ankaŭ de siaj genepoj kaj pragenepoj. Li verkis memuaron por la familio.

Lia kara fratino Peggy, kiu forpasis nur 6 semajnojn antaŭ li, ankaŭ estis ano de ELOA. Kiam Peg elvenis el Londono en la 60-aj

jaroj, kun bebo Rory, Owen subtenis ankaŭ ilin. Rory nun loĝas en Bostono, de kie li sendis mesaĝon, kiun legis Geoff, de amo kaj laŭdo por la kara onklo.

Arde sendependa, Owen influis multajn, redonante al la komunumo multflanke. Li fariĝis scienca esploristo en la Departamento de la Arbaro, kaj en sia libertempo interesiĝis pri kaj laboris por Esperanto, la Unuiĝintaj Nacioj, kaj la natura medio. Li traktis aliajn tiel kiel li mem volis esti traktata, ĉiam konsiderante la vivon, sanon kaj bonfarton de aliaj. Li ne estis juĝema, estis socie justa, fidinda, lojala, laborema – altruisma en ĉiu aspekto de sia vivo.

Daŭras sur paĝo 21 ➤



Stonehenge en Nov-Zelando

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Ĉu vi volas vojaĝi eksterlande? Ĉu ne eblas? Ĉu aŭstralianoj atendas almenaŭ eblecon por viziti Nov-Zelandon? Mi havas bonan novaĵon por vi!

Se ne eblas viziti Eŭropon, nov-zelandanoj kaj aŭstralianoj almenaŭ povas viziti sudan version de la fama Stonehenge en Nov-Zelando, apud Greytown je unu horo norde de Wellington.

Mi estas certa, ke vi scias pri la neolitika monumento en sudokcidenta Anglio konstruita antaŭ miloj da jaroj. Tiu estas granda rondforma grupo de ŝtonegoj, kiun oni ŝajne uzis kiel kalendaran ilon, sed ankaŭ por religiaj ritoj aŭ eble por tombejo, kvankam pri ĝiaj uzoj ekzistas diversaj duboj.

En Nov-Zelando, oni konstruis Stonehenge Aotearoa en 2005. Ĝi estas vizitinda turisma loko en bela, trankvila etoso apud ŝafplenaj kampoj. Vizito komenciĝas per filmo pri la angla Stonehenge kaj ĝenerale pri astronomio, astrologio, kaj rilataj aferoj. Estas eĉ eta ekspozicio pri esplorado de la planedo Marso. Poste oni rajtas promeni inter la ŝtonamaso (24 ŝtonoj altaj je proksimume 4 metroj) dum la tiea spertulo prelegas pri la historio de la loko kaj kiel oni povas kalkuli la hodiaŭan daton per la pozicio de la suno rilate al la ŝtonegoj. Mi ĝenerale ne interesiĝas pri tiaj aferoj sed mi trovis tiun klarigon tre utila kaj interesa. Imagu – antaŭ miloj da jaroj, kiam kalendaroj ne ekzistis, kamparanoj sciis, ekzemple, kiam estas taŭga dato por rikolti.



Stonehenge en Aŭstralio

TERRY MANLEY (ARMIDALE)

Kiam Vera Payne (nia fidinda provleganto) legis la artikolon pri Stonehenge en Nov-Zelando, ŝi atentigis min, ke ankaŭ ekzistas Stonehenge Aŭstralio en Esperance, Okcident-Aŭstralio.

En Esperance la konstruaĵo konsistas el 137 rozkoloraj granitaj ŝtonegoj kun tuta pezo de 2500 tunoj. Ĝi similas al kiel la originala aspektis antaŭ kvar mil jaroj. La ĉefaj orientiĝoj de la konstruaĵo montras la sunleviĝon kaj subiron je la solsticoj.

Estas interese, ke arkeologoj ofte agnoskas nemulton rilate la astronomiajn signifojn de tiuj megalitoj. Jes pri orientiĝo je solsticoj kaj ekvinoksoj sed pri aliaj astronomiaj aferoj, ne. Ili pli ofte emfazas la signifon pri ritejo kaj tombejo. Tio surprizas min.

En pra-anglujo (antaŭ la angloj, do ĝi ne estis anglujo tiam) estis centoj da tiuj konstruaĵoj. Kaj, se oni konsideras Eŭropon, estis miloj en tiu epoko. Kaj ili estis konstruataj dum miloj da jaroj. Kial? Jes estas indikoj, ke iuj uzis ilin por ritoj kaj la lokon por tomboj sed ĉu tiuj povis esti konsekvencoj pro honorigo al baza signifo, – ĉu ĉiela observejo? Arkeoastronomoj, kiuj studas la konstruaĵojn, opinias, ke ili ja estas observejoj.

La vorto *henge* (henĝo) havas signifon de ĉirkaŭanta ronda tranĉeo kun ekstera altaĵeto. Arkeologoj divenas, ke la celo de tio estas por protekti aŭ por kaŝi la enhavon.



Sed kio okazas kiam pluvas post fosado? Oni konjektas, ke la tranĉeo pleniĝus je akvo. Ĉu tio estas utila? Se oni deziras kalkuli aŭ manipuli la ebenecon de la areo, certe. Estas nur dum la pasintaj dek aŭ dudek jaroj, kiam oni uzas laserojn por la sama celo. Antaŭ tiam, oni ĉiam uzis aŭ akvon aŭ instrumenton kun aerbobelo en likvaĵo. Do povas esti, ke per tia rimedo, la prauloj povis sufiĉe precize mezuri ebenecon trans la tereno. Kaj tio gravas por ĉiela observado. Tiel oni kalkulas la altecon de objekto super la horizontalo.

Kvankam la ŝtona konstruaĵo Stonehenge datas de ĉ. 3100 a.K.E. (komenco de konstruado – kiu daŭris dum jarcentoj) estas spuroj de pli fruaj lignaj fosto



Stonehenge Aŭstralio en Esperance, Okcident-Aŭstralio

de 4000 a.K.E., kaj eĉ multe pli frue en la regiono. Kaj tiuj ankaŭ direktis orienten/okcidenten. Ĉu estas nur hazarda ludo de la prauloj?

Dum la pasintaj tri/kvar jaroj mi ludas tiel sur mia malantaŭa verando. Per liniigo de fosto sur la verando kun la fosto de mia malantaŭa barilo (la malantaŭo direktas nordorienten) mi rimarkas la direkton de sunleviĝo dum la sezonoj. Tiel oni konstatas kien estas la somera solstica sunleviĝo ktp. Sufiĉe simpla afero. Sed se oni plu ekzamenas la moviĝon de la suno kaj luno, oni plu lernas.

Malsupre mi metas tabelon pri tiuj direktoj de leviĝoj kaj subiroj de la suno kaj luno je venontaj suneklipsoj laŭ la retejo www.timeanddate.com – tre utila rimedo por mi, ĉar mi ne havas jardekojn, jarcentojn, jarmilojn por observi.

SUNEKLIPSOJ: Direktoj estas mezurataj for de nordo dekstren (Nordo = 0° Oriento = 90° ktp)

Dato	Sunleviĝo	Sunsubiro	Lunleviĝo	Lunsubiro
10 Jun 2021	64°	298°	64°	296°
4 Dec 2021	117°	243°	115°	243°
20 Apr 2023	77°	287°	80°	283°
14 Okt 2023	100°	260°	93°	264°
15 Okt 2023	100°	260°	100°	257°

Tiuj direktoj estas por mia urbo Armidale NSK, Aŭstralio. La plej rimarkinda afero en la tabelo estas la koincido laŭ direktoj por la sunleviĝo/subiro kaj la lunleviĝo/subiro. Kaj tio ne okazas je aliaj tempoj ol dum eklipsoj. Alia rimarkinda afero estas la rapida moviĝo de la lunleviĝo/subiro kompare al la suno, montrata per la direktoj en la lastaj du datoj: la 14a kaj 15a de Oktobro 2023.

Do mi scias, ke tio ne estas la tuta afero. Ĝi iom komplikiĝas pro la fakto, ke plena eklipso ne okazos en Armidale en iu tiuj datoj sed ĉe aliaj lokoj surteraj. Sed per longa persista observado, oni povas kalkuli pli precize ĉu eklipso okazos aŭ ne. Ekzemple, estas ciklo de 54 jaroj (Saros-ciklo) post kiam suneklipso okazos ĉe la sama loko sur la tero. Aliaj cikloj ekzistas kaj same estas observeblaj dum longa tempo.

La direktoj dum luneklipsoj estas kontraŭaj. Do ekzemple, se la sunleviĝo estas 85° , la lunsuĉiro estas tute kontraŭa je 265° ($85^\circ + 180^\circ$). La luneklipsoj estas pli ofte plenaj eklipsoj pro la fakto, ke la tero, kiu ombras la lunon, estas kvaroble pli granda ol la luno. Do por observi la ciklojn de luneklipsoj oni bezonas malpli da tempo ol por observi suneklipsojn.

Ĉi tiuj fenomenoj estas observataj de homoj dum miloj da jaroj – eĉ dekmiloj da jaroj. Ĉu surprize, ke grupo iam decidis plu esplori per mezurado?

En la libro, *Sand Talk* (sabla-parolado), la aŭtoro Tyson Yunkaporta priskribas viziton al "borda tereno", la ŝtatlimo inter NSK, Kvinslando kaj Sud-aŭstralio:

"Grandaj gravuritaj poluritaj ŝtonoj estis metataj tra la ejo,... stakigataj aŭ vicigataj... estas pli ol ni povas kalkuli sur ĉi tiu tereno, kiu enhavas sunkalendaron apartigantan la sezonojn kaj mezurantan la moviĝojn de la ĉielaj objektoj."

Mi sentas, ke kiel civilizacio tre teknike progresema, ni foje forgesas, ke niaj prauloj havis inteligentecon. Ni iel bildigas ilin kiel kavernloĝantojn, kiuj tiras la virinojn kavernen per la hararo. La arkeologoj kaj historiistoj ne kredas, ke la prauloj komprenis la ĉielobjektojn, ĉar ili ne havis skribsistemon por klarigi pri tio. Sed ĉu niaj arkeologoj mistrafas ion, ĉar ili tro longe rigardas teren kaj ne ĉielen kaj ĉu la historiistoj ankaŭ mistrafas tion, ĉar la skribsistemo estas en la aranĝo de la ŝtonoj mem?



Matematikisto pensas pri Dio

CHRISTOPHER COOPER

(TRADUKIS KAJ ENKONDUKAS JONATHAN COOPER, GOSFORD)

Mia pli maljuna frato Christopher antaŭ nelonge verkis libron, *The God Theorem: God seen through the eyes of a mathematician* (La Dio-teoremo: Dio vidata per la okuloj de matematikisto), en kiu li eksplikas sian mondkoncepton kaj spiritan fidon, kaj diskutas iujn tiklajn demandojn pri la vivo, filozofio kaj moralo. Ĉar li estas matematikisto, lia aliro estas per sistemo de logiko. Kaj fundamenta koncepto de logiko kaj matematiko estas tio de aksiomoj.

Aksiomo estas aserto ne provebla, sed konsiderata kiel vera, por servi kiel premiso aŭ deirpunkto por pliaj rezonado kaj pruvoj. Multajn oni rigardas kiel memkompreneblajn (ekz-e, "Se $a=b$ kaj $b=c$ tiam $a=c$ ") sed ne devas esti.

La teksto, kiu sekvas, estas mia traduko de (redaktita versio de) ĉapitro 3: "Mia Kredo".


Mi traserĉis en mia menso, eble eĉ en mia koro, la fundamentajn aksiomojn, sur kiuj mi bazas mian mondkoncepton. Jen ili:

Aksiomo 1: Mi ekzistas.

"Mi rezonas, do mi ekzistas," skribis René Descartes (Renato Kartezio). La brakoj kaj kruroj, kiujn mi vidas, kaj kiujn mi sentas kiam ili estas tuŝitaj, eble ne vere ekzistas. Mi povus esti tute "menso". Sed estas klare, ke mi ekzistas.

Aksiomo 2: La ekstera mondo ekzistas.

Ĉu eblas, ke la ekstera mondo estas nur iluzio? Homoj aŭdas voĉojn, kiuj ne ekzistas, kaj ili vidas viziojn. La fenomeno de fantomaj membroj post amputado estas bone konata. En sonĝoj, mi vidas kaj aŭdas aferojn, kiuj ne ekzistas. Mi foje havis sonĝon, en kiu mi vekiĝis kaj pensis, kun iom da trankvilo, "Dank' al Dio, ke tio estis nur sonĝo." Poste, iom poste, mi vere vekiĝis – sonĝo ene de sonĝo! Kio okazus se tio, kion mi nun nomas "reala vivo", estas nur sonĝo? Eble kiam mi mortos, mi vere vekiĝos permanente. Tamen la vivo havas



pli da senco, se mi akceptas, ke la ekstera mondo efektive ekzistas.

Aksiomo 3: Vi ekzistas.

Ne, tio ne estas nur konsekvenco de aksiomo 2. Mi povas vidi kaj aŭdi vin, kaj eble eĉ tuŝi vin. Per aksiomo 2, mi konsentas, ke via korpo ekzistas. Sed vi ne estas via korpo. Eble mi estas la sola homo, kiu havas konscion. Eble la cetero de vi estas nur robotoj.

Estas aserto, ofte farita de homoj, kiuj supozeble havas iom da scio pri la cerbo, ke iu komputila aparato kun pli ol iom da komplekseco aŭtomate konsciiĝas. Sed kiel oni povas decidi la veron de tia aserto? Mi eĉ ne povas pruvi, ke vi havas konscion! Do mi devas akcepti ĝin kiel aksiomon.

Aksiomo 4: Memoro estas kontinua.

Ni estas tio, kion ni memoras. Imagu se, dum la nokto, iu forviŝis miajn memoraĵojn kaj anstataŭigis ilin per tiuj de iu alia. Mi fariĝus tiu persono. Mi rigardus mian vizaĝon en la spegulo kaj supozus, ke iu faris al mi platan kirurgion dum mi dormis. Kiu mi vere estus: la persono kies memoro sidas en mia cerbo, aŭ tiu, en kies cerbo tiuj memoroj nun loĝas, kaj en kies korpo sidas mia cerbo?

Kiel plej multaj el vi, mi kredas, ke miaj memoraĵoj estas sufiĉe ĝustaj. Mi povas akcepti kelkajn okazojn, kiam mi mismemoris iujn aferojn, sed mi estas tiu, kiun mi memoras esti.

Aksiomo 5: Logiko validas.

Mi akceptas norman logikon, per kiu aferoj estas aŭ VERA aŭ FALSA, logikon kun 'KAJ', 'AŬ', 'SE', 'TIAM', kaj 'NE'. Almenaŭ mi akceptas ĝin, kondiĉe ke mi ne provas uzi memreferencajn asertojn kiel "ĈI TIU FRAZO ESTAS FALSA."

Iuj logikistoj defiis tiun norman logikon kaj elpensis alternativajn versiojn. Sed

mi rimarkis, ke kiam ili skribas pri siaj alternativaj logikoj, kaj en sia ordinara vivo, ili sekvas norman logikon.

Plej multaj homoj akceptas norman logikon subkonscie. Ili diras: "Vi certe ne lasis la ŝlosilon sur la tablo ĉar ĝi ne estas tie nun," sed ne rimarkas, ke ili uzis la formon de rezonado konata kiel "pruvo per kontraŭdiro".

Aksiomo 6: Estas io preter la materia universo.

Ĉi tie vi eble komencos malkonsenti kun mi. Same kiel ĉiuj supraj aksiomoj, mi ne povas pruvi ĝin. Tial mi nomas ĝin aksiomo. Materiistoj neas tiun aksiomon. Ili argumentas, ke ĉiu penso estas nur produkto de biokemiaj procezoj en la cerbo. "Amo" estas nur la biologia devo generi, kiu pelas evolucion. Kaj tiel plu.

Certe mi akceptas multon, kion ili diras. La devo generi certe estas grava faktoro por enamiĝi. Ĉu ĝi ankoraŭ klarigas la memdediĉon de geedzaj paroj en ilia maljuneco, mi ne estas certa.

La problemo pri la doktrino de la materiisto estas la konstato, ke iliaj kredindaj argumentoj estas nur produktoj de biokemiaj procezoj okazantaj en iliaj cerboj. Eble ili estas materiistoj nur pro sia genetiko?

Aksiomo 7: Ni ĉiuj havas liberan volon.

Mi intencis diri: "Mi havas liberan volon," sed sekve de aksiomo 3, mi pretas fari ĝin pli ĝenerala. Mi estas la centro de la universo, sed ankaŭ vi estas.

Mi ne estas la unua, kiu agnoskas, ke tiu libera volo havas limojn. Mi ne estas tute libera, kaj ankaŭ vi ne estas. Eksteraj cirkonstancoj metas limojn al tiuj aferojn, kiujn ni povas elekti fari.

Do, kun tiuj kvalifikoj, mi kredas tiun aksiomon. Tio metas grandan respondecon sur min. Ĉu mi faros la

ĝustajn elektojn? Mi devas povi antaŭvidi la konsekvencojn de miaj elektoj. Estus tiom pli facile, se oni ne respondecus pri siaj agoj. Se mi farus krimon – nu, mi estis programita fari tion. Mia moralo estus tre simpla – nur prizorgu min mem, ĉar mia elekto fari tion devas esti antaŭdirektita.

Aksiomo 8: Dio ekzistas.

La "io", kiu kreis la universon, iel estas estaĵo, persono, kapabla ami siajn estaĵojn kaj interagi kun ili. Tio estas la plej granda fido de ĉiuj. Kiel ĉiuj antaŭaj kredoj, mi ne povas pruvi ĝin. Sed nek oni povas malkonfirmi ĝin. Ĝi estas aksiomo.

Mi nur povas diri, ke kredo je persona Dio estas la fundamento por mondkoncepto, kiu por mi havas sencon. Tial ni akceptas aksiomon. Ĝi helpas nin kompreni aferojn. Kompreneble ni ne akceptus iun kredon, kiun ni povas malpruvi, nur ĉar ĝi helpas nin kompreni la mondon. Sed se temas pri io nedecidebla – kiam ni devas elekti inter du alternativoj, kiujn ambaŭ ni ne povas pruvi – tiam la pli oportuna estu tiu, kiun ni elektas. Jen kion ni faras en matematiko, kial ne en la vivo?

Praaj homoj ĉiam fidis je ia dio aŭ dioj por ekspliki aferojn, kiujn ili ne komprenis, ekzemple fulmon. Sed nun, kiam scienco povas ekspliki tiajn aferojn, ni povas malhavi tiajn diojn kiel klarigon. Sed ĉar la amplekso de la neklarigeblaj malgrandiĝis, estas tente kredi, ke iam tio tute malaperos kaj ke scienco eksplikos ĉion.

Ke racia pensado povas ekspliki la eksteran mondon ne surprizas. Ke racia pensado povas ekspliki grandan parton de niaj internaj vivoj same ne mirigas. Ke racia pensado povas ekspliki la plej profundajn misterojn de racia pensado mem, ŝajnas esti tro multe cirkla argumento, por ke mi akceptu. Ĉiu ajn edukita en matematika mondo scias,

ke memreferenco kondukas al logikaj problemoj.

Do tio estas mia elekto. Vi rajtas malakcepti tiun aksiomon, se tio helpas vin kompreni la mondon. Fido je Dio ne rilatas al intelekta kapablo. Estis grandaj pensuloj, kiuj estis ateistoj. Sed estis ankaŭ multaj grandaj pensuloj, kiuj fidis je Dio.

Nun mi bedaŭras diri, ke la kvalito de ateistoj malboniĝis dum la lastaj jardekoj. Grandaj pensuloj, kiel Friedrich Nietzsche kaj Bertrand Russell, povus starigi grandajn argumentojn, kiuj subtenis ateismon. Tamen multaj el la nuntempaj ateistoj uzis la taktikojn de nuntempaj politikistoj: ĵeti koton kaj uzi sloganojn.

Aksiomo 9: Kristanismo provizas fidindan kadron, per kiu koni Dion.

Kial ne judismo aŭ islamo? Kial ne budhismo? Mi supozas, ke la ĉefa kialo estas, ke mi elkreskis en kristana medio. Kristanismo montriĝis por mi tre kontentiga diismo, do ŝajnis esti neniu kialo iri aliloken.

Mi malakceptas la ideon, ke oni faru studon pri ĉiuj ĉefaj mondaj religioj por trovi la plej bonan. Mi ne sekvis tiun principon kiam mi elektis edzinon. Mi amas ŝin multe kaj ŝi estas ĉio, kion mi volus en edzino. Tamen prudento sugestas, ke ie mi eble trovus edzinon iomete pli taŭgan por mi. Sed la vivo estas mallonga. La viro, kiu pasigas sian tutan vivon rendevuante, por trovi la plej taŭgan edzinon, restos sola dum sia tuta vivo.

Se mi trovus, ke kristanismo ne plu kontentigus min, mi certe irus serĉi aliloke. Tamen kristanismo kreskas en mi kaj, dum tempo pasas, ĝi fariĝas pli kontentiga medio por ĉiuj miaj spiritaj bezonoj. Se mi estus naskita en juda aŭ islama familio, mi eble restus en tiu religio.

Tio ne signifas, ke ĉiuj religioj estas egalaj. Kiel kristano mi kredas, ke per Kristo mi ricevas pli klaran bildon pri Dio ol se mi estus juda aŭ islama. Sed eble se mi estus iu el tiuj, mi povus pensi same pri tiu religio.

Kion diri pri la vera religio? Ili ĉiuj pli malpli veras. Ili vere ne kontraŭdiras unu

la alian en iuj ajn el la fundamentoj. Ĉiuj tri “religioj de la Libro” (judismo, kristanismo kaj islamo) antaŭenigas amon al onia proksimulo, kaj plej multaj praktikantoj de ĉiuj tri religioj ŝajnas serioze provi sekvi bonan vivon. Mi akceptas homojn de ĉiuj tri kiel kunvojaĝantoj. Estas nur persona elekto por mi resti kun kristanismo.

Por elŝuti tiun libron, kaj aliajn de Christopher Cooper, iru al coopersbooks.net.

Malriĉeco en riĉa lando

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Antaŭ deko da jaroj mi kutimis danci en preĝeja halo, kie surmuraj afiŝoj anoncis, ke tiu preĝejo agas cele malaperigi malriĉecon. Bedaŭrinde, laŭ mia observado, ĝi ne atingis sian celon kaj la granda malegaleco ene de plejparte de la landoj aŭ inter la landoj, kiu ekzistis antaŭ la nuna pandemio, pli akriĝis.

Dum jaroj profesoro Marc Rank el la universitato de Wisconsin studis malriĉecon, malegalecon kaj socian justecon kiel montras la titolo de liaj publikaĵoj – *Vivi je la marĝeno: la realoj de la bonfartaj pagoj en Usono, Kial usona malriĉeco havas influon sur ĉiuj ni*, aŭ la lasta, *Malbone komprenata: tio, kion Usono malĝuste komprenas pri malriĉeco*. Li asertas, ke ekzistas mitoj pri malriĉeco, tiom malnovaj – la biblio aludas la malriĉulojn – ke tiu stato ŝajnas esti neevitebla. Plie la valoroj sur kiuj baziĝas la usona socio, estas individualismo, memdependado, “meritokratio”, kio kondukas al la ideo ke malriĉulo kreis tiun staton al si mem, meritas ĝin, kaj ne instigas al helpo al la malriĉuloj aŭ al ŝanĝo de la kondiĉoj.

De tempo al tempo politikisto deklaras militon kontraŭ malriĉeco: ekzemple Bob

Hawke de 1983 ĝis 1989 en Aŭstralio, Lyndon B Johnson en Usono. Kvankam prezidento Reagan diris poste, ke se la registaro militas kontraŭ malriĉeco, malriĉeco venkos, la rezulto de tiu “milito” ne estas kompleta malapero de malriĉeco, sed plibonigis la situacion: dum 20% de la usona loĝantaro estis klasifikitaj kiel malriĉuloj en 1959, en 1973 tiu proporcio falis ĝis 7%.

Malriĉeco multe kostas al la ŝtato. En Usono la kosto atingas 28% de la budĝeto. Eblas ŝpari monon se la registaro pagas por malhelpi, ke homoj falu en malriĉecon, por ke infano ne kresku en malriĉeco. Por \$1 elspezita, \$7 ĝis \$12 estas ŝparitaj. Tamen en multaj landoj, la registaro preferas pagi pli por malpli bona rezulto kaj ne facile subtenas la homojn, kiuj bezonas ĝian financan subtenon. La mito estas, ke multaj homoj friponas por ricevi subtenon al kiu ili ne rajtas. Fakte la postuloj por pruvi sin rajtanta estas tiom drastaj, ke ege malmultaj homoj sukcesas trompi la instancojn.

Pro la konstanta evoluo de la bezonoj en la labormerkato, mankas kompetentuloj en certaj sferoj dum estas pletoro da aliaj laboristoj, kiuj ne povas


trovi laboron same kiel la junuloj por kiuj la dungantoj jam postulas sperton. Tamen alia mito estas ke tiuj homoj ne volas labori kaj preferas ricevi financon subtenon de la ŝtato. La nuna aŭstralia ĉefministro donis tiun argumenton por ĉesigi la pagon de altigita monsumo pro la pandemio al senlaboruloj, kvankam ĉiu scias, ke ne eblas dece vivi per \$40 tage.

La nombro da malriĉuloj kreskas. La salajroj stagnas. Plentempa laboro fariĝas pli kaj pli malofta. Iuj homoj, kiuj forte laboras plentempe, ne gajnas sufiĉe da mono por nutri, vesti sin kaj

sian familion, kaj devas peti helpon de karitataj organizoj.

Eblas forigi malriĉecon, aparte en riĉaj landoj. Sed paradokse, la pli granda nombro da malriĉuloj loĝas en la plej riĉa lando, Usono. Kiu profitas de tiu situacio? Kiu havas intereson al malhelpo de ŝanĝo? Unu el la celoj de Esperanto estas alporti pacon en la mondon. Ĉu paco eblas kiam regas granda malegaleco, kiu kondukas al malriĉeco? Ĉu por disvastigi pacon, esperantistoj devus informiĝi pri la realo de la socio kaj trovi manieron kontribui al malaperado de malriĉeco?

Daniel Kane 1948–2021



Daniel Kane (Kāng Dān:) naskiĝis en 1948 en Melburno. Perdinta la patron kiam juna, li forlasis la lernejon por labori en banko kiel 15-jaraĝulo. Tie li malkovris talenton pri lingvoj. Dum tiu tempo Melburno estis magneto por enmigrantoj kaj li trovis, kiam ili alvenis al la banko, ke li povas facile komuniki kun tiuj. Kiel 14-jaraĝulo, li lernis Esperanton kaj aliĝis al la Melburna grupo, kie li certe havis kontakton kun la multaj enmigrantoj, kun kiuj li certe havis facilan komunikilon: Esperanton.

Li plustudis parttempe kaj gajnis eniron al la Universitato de Melburno, kie li diplomiĝis en 1971 kun honoroj en kelkaj lingvoj, kun ĉefstudoj pri la ĉina. Pro tio li akceptiĝis en la Aŭstralia Nacia Universitato por doktoriĝi. Li finis tion en 1975 kun disertacio pri la mortinta Ĝurĉen lingvo, lingvo de la Dinastio Jin (266-420). En 1976 li magistris pri aziaj studoj ĉe la sama universitato.

Paralele li havis karieron en la diplomata servo. Li dungigis ĉe la Aŭstralia Ministerio pri Alilandaj Aferoj (Australian Department of Foreign Affairs) kaj havis postenon en Pekino dum la frua reformada periodo kaj speciale la periodo de la Demokrata Muro (Democracy Wall). Li estis Kultura Konsilisto ĉe la aŭstralia ambasadejo en Pekino dum la 1990-aj jaroj.

Akademie, li estis lekciisto pri la ĉina lingvo ĉe la Universitato de Melburno en

1981 kaj vizitanta klerulo pri la ĉina en la Pekina Universitato en 1988 kaj 1993. En 1997 li iĝis profesoro de ĉinaj studoj ĉe la Universitato Macquarie.

Lia edzino Yè Xiǎoqīng mortis en 2010. Ŝi estis ŝanhaja klerulo pri Ĉjinga (Qing) historio kaj ĉina modernigo.

Dani suferis pri parkinsona malsano dum kelkaj jaroj kaj mortis la 16-an de Aprilo 2021.

Memoroj de amikoj

Heather Heldzingen

Danny ja lernis Esperanton kiam li havis 14 jarojn ĉe la Melburno klubo. Mi lernis Esperanton tie unu jaron poste. Danny unue loĝis en Riĉmondo kun sia familio (gepatroj kaj fratino). Lia patro estis TPI (pensiulo pro handikapado). La familio finfine akiris apartamenton provizitan per la registraro en Nord-Melburno. Li laboris en la Banko Commonwealth (tiam nacia banko) ekde sia 15 jaraĝo por helpi pri la financoj de sia familio. Kiam mi renkontis lin, li bone regis la italan kaj rusan lingvojn. La familio estis katolika kaj li iris al katolika lernejo kie li lernis kiel paroli kun la italaj studentoj. Li ankaŭ studis la rusan lingvon. Li kaj mia edzo Ivan laboris ĉe la sama banko kaj ambaŭ lernis la rusan kaj Esperanton. Unu kliento (universitata akademiano) de la banko notis lian facilecon pri lingvoj kaj instigis lin studi lingvojn je universitata nivelo. Li koncentrigis pri la ĉina lingvo kaj poste ricevis sian diplomon kaj la diplomata servo dungis lin. Li ricevis subtenon de Ralph Harry, kiu estis ankaŭ en la diplomata servo, dum tiu tempo. Li edziĝis kun ĉina virino kaj havis filon kaj

filinon, kiuj loĝas en Melburno. Post ilia eksedziĝo li lasis la diplomatan servon kaj laboris ĉe la Melburna Universitato, kie li renkontis sian duan edzinon. Kun ŝi ili havis alian filon (Ian), kiu loĝas en Sidnejo. Li iĝis la Profesoro de la ĉina lingvo ĉe Universitato Macquarie kaj lia edzino iĝis Profesoro de Ĉina Literaturo ĉe la sama loko. Danny regis 12 vivantajn lingvojn kaj 4 mortintajn lingvojn. Li estis spertulo pri malnovaj mongoliaj lingvoj kaj verkis libron pri tiu temo, Fakte li estis la mondspertulo pri malnovaj mongoliaj lingvoj.

Sandor Horvath

Mi renkontis Dani la unuan fojon dum la somerkursaro en Sidnejo en 2000. Li tuj plaĉis al mi. Li estis amuza, vigla kaj interesa instruisto. Kaj li parolis la ĉinan, kaj baldaŭ eĉ klarigis al mi, ke Genghis Khan ne estis tiel terura, kiel homoj kutime asertas.

Dani estis ankaŭ la unua, kiun mi aŭdis vere kaj serioze sakri en Esperanto. Li havis viglan kaj sufiĉe aĉan kverelon kun iu ĉino, kaj kiam lia kontraŭulo ne vere komprenis, li simple daŭrigis blasfemi en la ĉina.

Mi ĉiam vere ĝuis kiam li aperis dum iu el nia eventoj aŭ kiam mi renkontis lin dum iu internacia evento eksterlanda. Lia sprita, gaja maniero tre plaĉis al mi. Dani vere mankos al la aŭstraliaj esperantistoj.

Trevor Steele

Mi renkontis Danny tre malofte, sed li faris sur min impreson de inteligenta, amikema homo kun multaj interesoj kaj sindediĉo al la progreso de nia komuna lingvo. *Vale*, Danny!

Charles Stevenson

Mi estas ĝiskore malĝoja pro la morto de mia amiko Danny Kane. Mi memoras lin je 1965 kiel dek-ses-jara junulo, vivema, afabla, sperta pri preskaŭ ĉio, certe pri Esperanto kiun li jam parolis flue.

Juna komediulo, Danny ne nur aktoris en neforgeseblaj teatraĵoj por Zamenhof-Festoj, sed amuzis nin, egale neforgeseble, per sia kompetenta rikolto de riĉaj Esperantaj vortoj, kiujn li konstruis el sufiksoj ktp, kaj prezentis kun malpia rideto.

Ekzemple, li decidis fondi ĵurnalon por junuloj. Marguerita Fink iĝis la redaktorino. Sed estis Danny kiu nomis ĝin "Umeco". Danny ŝatas ŝerci. Kion signifas Umeco? Nenion? "Um" estas sufikso kun nedefinebla senco, krom se oni metis ĝin kun substantiva vorto, ekzemple, se oni diras "kafUMi", oni scias ke oni iras por trinki kafon. Tamen tiu ne eksplikas "Umeco"-n: Umeco estis nur unu vorto per kiu Danny ludis. Danny, kiu tre ŝatis malfacilaĵojn, preskaŭ inventis novan vorton sen preciza signifo.

Dum sia vivo Danny Kane spertis kaj la malbonan kaj la bonegan – supezeble tiuj travivaĵoj pliiĝis sian amikecon, kaj sian kompatan homecon. Sed tra tiuj multaj travivaĵoj floris ĉiam la vortludado de Danny.

Al ni mankos kaj la gajeco kaj la saĝeco, kiuj fluis humile kaj vive pro kamaradeco kun Danny.

Terry Manley

Daniel, spite familiajn respondecojn pri juna filo en 2000, konsentis instrui dum la AEA-a kongreso/kursaro. Ĉiun tagon li veturis per trajno de la norda parto de Sidnejo al la Universitato de Sidnejo, kie okazis la evento. Estis honoro havi tian spertan, fluparolan esperantiston inter la instruistoj.

Mi, tiutempe, loĝis ne tre for de Daniel, ĉe Cheltenham. Iufoje li vizitis min kun sia filo.

Por mi Daniel estis ridetema, afabla amiko, kiu rapide sed klare parolis Esperanton kaj, kvankam dungata en alta posteno ĉe Universitato Macquarie, estis humila homo pri siaj atingoj.

Restu pace ridetanta, Daniel.

Can Zamu (Turkio)



En la jaro 2012 aprilo en sudoriento de Turkio (Gaziantep, Urfa, kaj Mardin) estis kvin MEK-aranĝoj. Ankaŭ partoprenis diverslandaj esperantistoj. Mi restis kun Daniel en la sama ĉambro. Mi tre malĝojas

kaj kondolencas pro lia morto. Mi havas kelkajn fotojn kiel belegajn memoraĵojn.

Rainer Kurz (Germanio)

Mi bone memoras Danny por sia agrabla gastigemeco. Mi havis bonan komunan tempon kiam mi renkontis lin en Redfern, Epping kaj en la aŭstralia Esperantujo. Mi bone memoras liajn bonajn ideojn, kreemajn iniciatojn kaj pozitivan energion. Tre imponis min lia multkolora vivo kaj liaj kontribuoj al edukado, esplorado kaj Esperanto. Danny mankas!

Ilia Dewi (Indonezio)



Legante la afiŝon de Nicole Else pri la forpaso de Daniel Kane sur Facebook, mi sentas min tre trista. Estas ŝokiga novaĵo, kvankam mi sciis, ke Dani diris, li havas problemon pri la piedoj. Tial li ne

plu deziras vojaĝi. Tiam mi re-renkontis lin en la 8-a azia kongreso en Ĉinio, 2016, kaj plurfoje ni babilis pri io ajn kaj kunmangis en la vespero. Mi rimarkis, ke Dani tre bone parolis la ĉinan kaj solvis mian problemon en la restoracio.

Mi memoras la unuan renkontiĝon en Melburno kiam mi partoprenis en la kongreso de AEA en 2015. Li estis tre afabla amiko. Mi tre ĝojis kiam li venis al Indonezio por partopreni en la 1-a Trilanda Kongreso, 2016, kaj ankaŭ helpis instrui la komencantojn. Mi kredas, ke ĉiuj lernantoj ĝuis lian instruadon. Kelkaj afiŝis belajn fotojn kun Dani sur Facebook kaj amikiĝis kun li. Li ankaŭ donacis kaj sendis multe da Esperantaj libroj al mi, kiujn mi utiligas por la indonezia movado.

Mi memoras Dani kiel bonkora amiko. Mi profunde kondolencas. Forton al liaj familianoj. Koran dankon por ĉio, Dani!

Josip Pleadin (Kroatio)

Kun Daniel Kane mi konatiĝis tute hazarde somere de 2012, pere de mia sidneja amikino Nicole Else, kiu informis min, ke aŭstralia esperantisto, Daniel Kane, baldaŭ veturos al Kroatio. Daniel planis viziti la urbon Split en Dalmatio, kaj konsideris viziti la 10-an kongreson de kroataj esperantistoj, kiu devis okazi en Junio 2012 en Koprivnica. Ni interŝanĝis plurajn retmesaĝojn.



Daniel Kane dum kongresa tagmanĝo en Koprivnica

Al Daniel tre plaĉis la kongreso, sed multe pli ĝiaj turismaj programoj.

En novembro 2012 mi sendis al Daniel retmesaĝon pri la bildkarta ekspozicio, kiun planis Bjelovara Esperantista Societo okaze de Zamenhofa tago. Li tuj sendis belan bildkarton de Sidnejo, kiu estis ekspoziciita kun multaj aliaj bildkartoj en la biblioteko Petar Preradović en Bjelovar.

Daniel emeritiĝis fine de 2012, kaj nia kontakto provizore ĉesis.

Ĉar mi estas Esperanta eldonisto, en oktobro 2014 mi ekplanis eldoni la libron

de Tibor Sekelj, *Tra la lando de kanguruoj*. Ĉar mankis mono por tiu projekto, mi dissendis cirkuleron al aŭstraliaj esperantistoj, klopodante trovi iun, kiu helpus finance por realigi la projekton. Reagis Melburna Esperanto-Asocio, ... kaj Daniel. Mi danke publikigis iliajn nomojn en la libro, kiu aperis en 2015. Post la apero mi sendis ekzempleron de tiu libro al Daniel, kaj tio estis fino de niaj kontaktoj. Nun, post lia morto, mi tamen pretigis lian dosieron en la Dokumenta Esperanto-Centro, la enlanda Esperanto-arkivo en Kroatio, kiun mi gvidas.

Leteramikoj

NICOLE ELSE (SIDNEJO)

En la pasinta jarcento multaj esperantistoj havis korespondantojn kun kiuj ili interŝanĝis longajn leterojn.

Kiam ankoraŭ ne ekzistis komputiloj, esperantistoj jam ŝatis komuniki en Esperanto kun personoj en diversaj landoj. Por sendi leteron necesis iri al poŝtoŝtanco, pagi afrankon kaj do kutime oni ne faris tion por skribi nur kelkajn vortojn, sed relative longajn leterojn. Miaj gepatroj estis ambaŭ esperantistoj kaj geedziĝis

en la 1950aj jaroj. Mia patrino kreskis en Germanio, mia patro en Francio. Ili deziris havi korespondantojn. En la Esperantaj revuoj ja ofte estis korespondpetoj. Ankaŭ juna paro en Danlando deziris korespondi. Ili estis proksimume samaĝaj kiel miaj gepatroj. La edzino kreskis en Nederlando, la edzo en Danlando. Do iam en la 1950aj jaroj ili ekkorespondis. Ambaŭ paroj tiam ankoraŭ ne havis infanojn. Fine de la 1950aj jaroj, filino

Grethe naskiĝis kaj fariĝis denaska Esperantisto. Miaj gepatroj ricevis fotojn de la ĉarma bebo Grethe. Du jarojn poste ankaŭ miaj gepatroj povis sendi fotojn de bebo, ĉar mi naskiĝis.

Mia patrino ĉiam ŝatis skribi longajn leterojn. Ŝi faris tiun taskon tre serioze, ĉiam cerbumante kiajn interesajn aferojn ŝi povus priskribi kaj ankaŭ ŝi volis sendi belajn leterojn, do ofte



Foto de 1956: meze la dana paro, maldekstre mia patro, dekstre mia patrino

ŝi ornamis la leterojn per malgrandaj desegnoj aŭ algluis etajn bildojn.

Ili ne nur korespondis, sed ankaŭ foje, tamen malofte, renkontiĝis. En 1956 ili unuafoje renkontiĝis en Nederlando.

En 1974 miaj gepatroj kaj mi vojaĝis al Danio kaj ni do vizitis la danajn korespondantojn. Ne estis la unua renkontiĝo kiam ambaŭ paroj jam havis filinon. Mi havas foton faritan ĉirkaŭ 1972 kaj probable fotita en Belgio:



La maldekstra knabino estas mi, la dekstra knabino estas Grethe. La meza knabino estas Ana-Maria ankaŭ denaska Esperantistino (belga patrino, portugala patro).

En 1980 Grethe kaj mi partoprenis en la IJK (Internacia Junulara Kongreso) en

Raŭmo, Finnlando.

Post mia translokiĝo al Aŭstralio, mi ne plu revidis Grethe dum 30 jaroj, sed mi ja finfine revidis ŝin dum la Universala Kongreso en Lille en 2015. Tamen ni daŭre korespondis. Unue skribis ĉefe la gepatroj de Grethe, sed kiam ili forpasis, Grethe diligente transprenis la taskon kaj skribis al miaj gepatroj kaj mi. Nun kiam ankaŭ miaj gepatroj mortis, ŝi daŭrigas skribi al mi. La korespondado inter niaj gepatroj daŭris dum pli ol 50 jaroj kaj nun daŭras ankoraŭ kun la venonta generacio. Kiam mi estis infano, mi memoras, ke miaj gepatroj ĉiam ĝojis kiam alvenis letero el Danio kaj ili ofte babilis pri la enhavo de la leteroj.

Ĉar mia patro neniam lernis uzi komputilon, Grethe ĉiam sendis paperajn leterojn al li, tamen mi ricevis kopion de ili nur rete. Nun niaj interŝanĝoj estas nur rete, tamen Grethe konservis la kutimon sendi kvazaŭ leteron. Tio estas, ke ŝi ne skribas oftajn mallongajn mesaĝojn sed sendas rete tutaĝan mesaĝon.

Nuntempe multaj personoj ne plu skribas leterojn, nur mallongajn mesaĝojn. Mia patrino certe trapasis almenaŭ unu horon ĉiun fojon kiam ŝi skribis leteron.

Estas bonege povi rapide sendi mallongajn mesaĝojn al geamikoj, sed ĉu ne estas ankaŭ bezono foje ricevi pli longajn leterojn skribitajn malrapide? Nun estas facile kaj malmultkoste paroli telefone aŭ Skajpe. Ja estas agrable povi ricevi respondojn, komentojn tuj, sed ankaŭ estis agrable relegi leterojn kaj do povi memori tion kion la persono esprimis antaŭ pluraj monatoj aŭ eĉ pluraj jaroj. Mi certe, ekzemple, konservis leterojn, kiujn mia kara avino sendis al mi antaŭ 50 jaroj.



1980 gazetartikolo pri la IJK. Grethe estas maldekstre, kaj mi estas dekstre de la staranta viro

Monto Viktoria kaj Heinrich Guenther Rienits

TERRY MANLEY (ARMIDALE)

En Majo, mi kaj mia familio iris al la NSK-a regiono Monto Viktoria por la geedziĝfesto de mia nevino Rebecca. Mi kaptis la ŝancon por iom ferii kaj antaŭ kaj post la festo. Dankon al la Esperanto-Federacio de NSK, kiu helpis pri loĝado en Sidnejo ĉe la gastĉambro en Esperanto-Domo.

Ĉe Monto Viktoria, ni piedmarŝis en la arbaro. Tie mi rimarkis la nomon Rienits kaj pensis, "Mi iam antaŭe vidis tiun nomon." La nomo aperis sur mapo en la regiono, kie ni marŝis: "Rienits Pass" (montpasejo de Rienits). Ankaŭ en la urbeto mem mi rimarkis aludojn al tiu nomo.

Do Heinrich (Henry) Rienits estis longdaŭra loĝanto en la urbeto. Li estis germano, kiu alvenis al Aŭstralio en 1863 kun sia familio kiel 11-jaraĝulo. Li edukiĝis kiel instruisto kaj, post deĵoroj en Hill End, Bourke kaj Mudgee, li estis postenigita al Monto Viktoria en 1880.

Nelonge post tio, pro malakordo kun lernejinspektoro, li rezignis kaj fondis sian propran lernejon, kiu simple nomiĝis "La Lernejo". La patro de Henry Lawson, Niels (Peter) Larson, konstruis ĝin. La lernejo koncentriĝis pri la instruado de ekonomiko.

Henry Rienits interesiĝis pri diversaj temoj. Kiel amatora geologo, li kolektis rokekzemplojn de la regiono. Li ankaŭ estis tre aktiva pri lokaj aferoj. Li fariĝis membro de la Progresiga Societo de Monto

Viktoria, en kiu li multe laboris por la jarcenta celebrado pri la blankula transiro de la Blua Montaro en 1813. Lia lernejo fermiĝis en 1913; ĉu pro la fakto, ke li estis germano kaj malpopulariĝis kiel instruisto, estis konjekto de iuj. Sed daŭre Henry laboris en la komunumo ĝis sia morto en 1928. Li estis laik-estro de la anglikana eklezio dum 35 jaroj.

Do kie mi vidis tiun nomon antaŭe? En la libro *Esperanto en Aŭstralio* de Ray Ross. Kaj ĝi aperas en la unua alineo! "Jam en la jaro 1889 Zamenhof notis la ricevon de leteroj el Aŭstralio, kaj en lia Dua Adresaro aperas la nomoj de la plej fruaj adeptoj": DG Rienits kaj Herman Ritz.

Sed kiu estis DG Rienits? Li estis la patro de Henry. Bedaŭrinde, Henry ne enkondukis Esperanton en sian lernejon. Sed en siaj lastaj jaroj, li laboris pri la tradukado de *The Vicar of Wakefield* (La Pastro de

Wejfkild) en Esperanton.

Iom da ĉi tiu informo alvenis de nepino de Henri, Mary Mills (nask. Rienits). Se mi ne eraras, mi havis kontakton kun Mary antaŭ 20–25 jaroj en Sidnejo.



Supre: Mapo ĉe la flanko de la vojeto. Sube: Elissa, mia filino, plus mi

► *Owen Loneragan: Daŭrante de paĝo 5*

Tute male al la averaĝa “laid back Aussie bloke”, (leĝera aŭstralia viro) Owen estis ĉiam stabila kaj serioza. Lia alia fratino, Cath, per video el Melburno, parolis pri la mankoj kaj defioj de la infanaĝo. Pro familiaj problemoj, la juna Owen, plej aĝa el kvar, fariĝis la “paĉjo” por la pli junaj gefratoj, kaj protektanto de la panjo. Li estis kapitano de loka futbalteamo (soccer), kaj ankaŭ ludis la korneton kaj la francan kornon.

Lastatempe, lia memoro iom post

iom perdiĝis, kaj Owen fariĝis 97-jaraĝa malfortulo. La morto liberigis kaj lin kaj lian familion de plua doloro kaj malĝojo. Ni aŭskultis al la kanto de John Lennon, *Imagine* (Imagu), dum ni rigardis la fotojn de nia ege respektita amiko, kiun mi persone konis ekde 1970, kiam la karmemoraj Owen Loneragan kaj Rene Smeets, kune kun mi, komencis lerni Esperanton. Dum la pasinta jardeko aŭ pli, Owen ankaŭ gastigis nin dum jarkunveno kaj aliaj kunsidoj, en sia domo. Ripozu en paco, kara samideano.

Kie vi estas?

Homoj regule bezonas komuniki pri lokoj – foje nebule (“la domo de mia amiko”), foje precize (“143 Lawson St, Redfern NSW 2016”). Ekzistas multaj manieroj por indiki specifan lokon sur la globo, kaj kompreneble, la manerio, kiun vi elektas, dependas de kial vi bezonas informi iun pri la loko, kaj kion ili jam scias.

Se, ekzemple, vi rakontas al via amiko pri aventuro, kiun vi kaj viaj kuzoj spertis kiel infanoj, “ĉe la parko” verŝajne tute sufiĉas, ĉar la rakonto ne vere temas pri la parko mem, kaj via amiko ne devas scii kie la parko estas por ĝui la rakonton. Tamen,

JOANNE JOHNS (BRISBANO)

vi eble devus doni iom pli da informo se vi volas renkonti vian amikon “ĉe la parko” je vendredo (krom se vi faras tion tiel ofte, ke vi ambaŭ komprenas, ke “ĉe la parko” signifas “ĉe la parko, kiun ni kutime vizitas”)

Se vi volas renkonti iun ie, aŭ aranĝi liveradon de pakaĵo, vi devas uzi adreson por informi pri la loko. Ĉi tiu adreso povus informi pri la lando, ŝtato, urbo, strato, stratnumero kaj eĉ etaĝo de konstruaĵo, kaj kutime estas sufiĉe bona metodo por trovi lokon.

Tamen, multaj lokoj sur la globo ne



havas adreson, aŭ la adreso ne estas sufiĉe specifa por montri malgrandan lokon. Eble vi bezonas esplori endanĝerigitajn papiliojn en la fora kamparo – per adreso oni eble atingus la antaŭan barilon, sed ne la specifan loĝlokon de la papilioj. Feliĉe, dum centoj da jaroj ni jam havas la teknologion priskribi punkton ie ajn sur la globo per ĝia latitudo kaj longitudo. Dum ĉirkaŭ 30 jaroj ni havas la eĉ pli bonan teknologion trovi tiun priskribon sen mem fari la matematikon, danke al la Tutmonda Loktrova Sistemo – aŭ GPS en la angla.

Per GPS-koordinatoj oni povas same facile priskribi la lokon de la Operejo de Sidnejo ($33^{\circ}51'28.4''\text{S}$ $151^{\circ}12'53.7''\text{E}$) kiel tio de gitar-forma arbaro ie en Argentino ($33^{\circ}52'04.4''\text{S}$ $63^{\circ}59'13.2''\text{W}$), kaj tio de neinteresa loko, meze de nenie en la pacifika oceano ($34^{\circ}59'10.1''\text{S}$ $138^{\circ}30'28.8''\text{W}$).

Alia, nova maniero por priskribi lokon ankaŭ ekzistas. En 2013, “What3words” (kiuj 3 vortoj) fondiĝis. What3words uzas “geokodojn” – pli facile legeblaj identigiloj de precizaj koordinatoj. Ili dividis la mondon en 57 trilionoj da kvadratoj, ĉiuj 3 metrojn larĝaj kaj 3 metrojn longaj. Ili donis al ĉiu kvadrato adreson, kiu konsistas de tri vortoj. Diri “beams.enjoy.pipes” estas pli facile kaj rapide ol “ $33^{\circ}51'28.4''\text{S}$ $151^{\circ}12'53.7''\text{E}$ ” ĉu ne?

La adresoj estas troveblaj per retejo aŭ aplikaĵo en via poŝtelefono (kiu povas funkcii sen interreto post la unua elŝuto), kaj estas haveblaj en 47 lingvoj (ankoraŭ

ne Esperanto). La adresoj ne estas rekte tradukitaj inter lingvoj, ĉar rektaj tradukoj eble kaŭzus adresojn kun pli ol tri vortoj. Ekzemple, la loko “beams.enjoy.pipes” (ĉe la ŝtuparo de la Sidneja Opera-Domo) estas “séparer.baryum.atomiseur” en la franca kaj “medizinerein.flugreise.ausgebreitet” en la germana.

Krom la aplikaĵo, What3words nun estas uzata de la nacia savserva aplikaĵo de Aŭstralio (Emergency Plus), kaj la savservoj de Anglujo, por pli facile trovi la lokojn de homoj, kiuj bezonas urĝan helpon. Ĝi ankaŭ haveblas en la navigaj sistemoj de kelkaj markoj de aŭtoj, taksiaj servoj en kelkaj landoj, kaj kelkaj firmaoj akceptos What3words-adresojn por liveri pakaĵojn.

Eble unu el la plej utilaj estontaj uzoj de What3words estos peti la senpilotan aviadilon, kiu liveras vian picon (aŭ pakaĵon) meti ĝin en vian malantaŭan korton por eviti ŝtelemajn najbarojn (aŭ en la antaŭan korton por eviti vian hundon!).

Estas alia geokoda sistemo kiu nomiĝas “pluskodoj”, kiun Google ŝajne kreis, sed en tiu sistemo nia operdomo lokiĝas ĉe “4RRH46R7+VX2” aŭ (laŭdire) pli mallonge “46R7+VX2 Sydney NSW, Australia”, kiu laŭ mi ne estas pli bone ol GPS-koordinatoj.

Nur tempo malkovros kiu sistemo pli populariĝos.

Por eltrovi pli pri What3words, vizitu what3words.com



Ĉu manĝi algojn? DONALD ROGERS (WELLINGTON)

Pro la rapida kresko de la homaro en la moderna epoko, oni devas konsideri la gravegan demandon, kiel ĉiuj havu sufiĉan nutraĵon. Restas nur du ebloj: la plej evidenta estas, pligrandigi la kvanton da manĝaĵoj; la alia estas serĉi novajn aŭ nekutimajn nutraĵojn. Unu ebla fonto de nekutimaj nutraĵoj estas algoj.

La algoj, kiuj kreskas en la maro, ne estas anoj de unu sola familio. Ili apartenas al grupoj de organismoj kun komuna praulo. Inter tiuj prauloj estas iuj verdaj plantoj, ekzemple muskoj kaj arboj. La plejmulto de algoj apartenas al la grupoj ruĝalgoj, brunalgoj, verdalgoj.

Multaj homoj kredas, ke algoj estas plantoj, sed ili konsistigas apartajn grupojn da organismoj, iuj unuĉelaj, aliaj grandegaj. Spirulino estas ekzemplo de mikroalga; oni manĝas ĝin kiel suplementon. Spirulino estas speco de cianobakterio. Laminarioj estas makroalgoj. Ili povas kreski ĝis 50 metrojn longaj.



Granda Laminario, *Macrocystis pyrifera*, en la maro

Oni jam bredas multajn speciojn de makroalgoj, aŭ rikoltas sovaĝajn, por uzi ilin por manĝaĵo aŭ por utila fonto de kemiaĵoj. Manĝi algojn havas avantaĝojn:

algoj enhavas jodon, antioksidantojn, fibrojn, kaj aliajn utilajn kemiaĵojn. Oni ne havas vastan scion pri algoj. Eble iuj komponantoj restas kaŝitaj en la el ili produktita manĝaĵo sed ne sufiĉe ensorbiĝas en la homan korpon. Eble ili nur produktas por ni vitaminriĉajn fekaĵojn. Algoj enhavas multan proteinon, kiu povas anstataŭi viandon, kaj multajn aminoacidojn, kiuj estas nepraj por la homoj.

Historie homoj, kiuj loĝis apud la maro, emis manĝi algojn. Algoj estas parto de la dieto en Ĉinujo, Japanujo kaj Koreujo ekde prahistoriaj tempoj. Algojn oni manĝas en tradiciaj societoj en Eŭropo, Ameriko, Azio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

Maralgoj en Aŭstralio

Maralgoj ludis rolon en la ĉiutaga vivo de indiĝenaj aŭstralianoj tra diversaj marbordaj regionoj. Oni certe ekspluatis algojn kiel utilan fonton por diversaj uzoj.

Aborigenoj kutimis manĝi la bidan algon Kolĉeno de Neptuno (*Hormosira banksii*, specio de brunalga kun oliv-ĝis-brun-koloraj bidoj aŭ "beroj"). Oni truis la bidojn por forigi la marakvon en ili, antaŭ ol kuiri la algon.



Malgranda *Hormosira* sur roko

Grupo da aŭstraliaj sciencistoj traserĉis ĉiujn konatajn skribitajn informojn pri la historia uzado de algoj age de la aborigenoj. Tiel, ili deziris helpi al indiĝenaj grupoj konservi siajn tradiciajn sciojn tiurilatajn; esperante, ke iuj indiĝenaj grupoj utiligos tiun scion kaj starigos novajn daŭrigeblajn industriojn por utiligi lokajn algojn. Ideale tio donos al indiĝenoj la eblecon trejniĝi, kaj dungigi en tiaj industrioj. Eble, utiligante tradiciajn sciojn, oni povos krei daŭrigeblan algoproduktan industrion en Aŭstralio kaj en Nov-Zelando.

Freŝa esplorado montris, ke kelkaj specioj de algoj estas nutroriĉaj, kaj meritas pluan esploron. Kelkaj havas kontraŭmikrobajn ecojn.

Laŭ la historia esplorado, oni uzis la ruĝalgon *Betaphycus speciosus* en la malfruaj 1800-jaroj por formi jeleon por manĝaĵo aŭ por gluo.

La historia — ofte devigita — migrado de indiĝenaj popoloj el siaj teritorioj rezultigis perdon de multa scio pri tradiciaj kutimoj.

Maralgoj en Nov-Zelando

Tradicie la Maorioj en Nov-Zelando uzis kelkajn speciojn de ruĝaj kaj verdaj algoj kiel manĝaĵojn. Ili nomis tiajn algojn *karengo*. La plej ofte manĝata specio estis *Pyropia columbina*. Ĝi estas preskaŭ sengusta kiam freŝa, sed havas fiŝecan guston kiam sekigita. Oni tiras ĝin for de la rokoj vintre kaj printempe, kaj sekigas ĝin en la aero antaŭ ol uzi ĝin. La *karengo* estis grava aldonaĵo al la vintra dieto de la fruepokaj maorioj pro ĝia alta nutra valoro — ĝis 30% da proteino, kaj sufiĉe da vitaminoj kaj jodo.

Post sekigo, oni povas friti ĝin, kaj ĝi havas krakmaĉan, lardan guston — precipe tiu el *Kaikōura* (marborda urbeto

en la Suda Insulo). Kvankam la praktiko ne vaste daŭras hodiaŭ, iuj maoriaj grupoj ankoraŭ rikoltas algojn el la maro, kaj leĝoj agnoskas tiun praktikon.

La mondscale plej valoraj manĝeblaj algoj nomiĝas japane *nori* (certaj specioj de la genro *Pyropia*). Norio enhavas diversajn sanigajn kemiaĵojn: jodo, fero, vitamino B12 kaj omega-tri-polinesaturitaj grasacidoj. Iuj konstituantoj havas kontraŭinflamajn aktivecojn, sed mankas sciencaj studoj pri tio. Pro kreskanta postulo por norio, kaj pli varmaj maroj en la tradiciaj norikreskaj regionoj, altkvalita norio estas malpli facile havebla, kaj prezoj kreskas.

En Nov-Zelando, la instituto Cawthron kunlaboras kun la maoria tribo Ngāi Tahu por esplori la eblecojn de similaj specioj kreskeblaj en la maro ĉirkaŭ Nov-Zelando.

La manĝebla maralgo *Durvillaea antarctica* estas granda, manĝebla, brunalga, ĝis kelkajn metrojn longa, kun fortaj teniloj al la rokoj. Ĝi kreskas en Nov-Zelando kaj Ĉilio, kaj en la subantarktaj insuloj. En Nov-Zelando, la Maorioj nomas ĝin *rimurapa* kaj uzis ĝin kiel manĝaĵon kaj por fari sakojn en kiuj ili konservis kuiritajn birdojn poste manĝotajn.



Durvillaea antarctica

Aliaj uzoj de algoj

Per grandskala algobredado, oni povas purigi oceanojn, pliigi biodiversecon, kaj pliefikigi akvokulturon. Algoj suĉas karbonan dioksidon el la aero. Oni povas fari biobrolaĵojn el algoj.

Ĉar algoj sorbas ĉion en la akvo, eĉ malpuraĵojn, oni devus manĝi nur algojn, kiuj kreskis en nepoluita akvo.

Furaĝo

Sciencistoj en Aŭstralio eksperimente aldonis la ruĝan algon *Asparagopsis taxiformis* al la grena furaĝo de bovinoj. Ili trovis, ke la bovinoj ne plu ruktis metanon, kiun bovinoj ĝenerale ruktas, kaj ke la bovinoj gajnis pezon pli rapide. Negativaj efektoj ne troviĝis, kaj la kvalito de la viando estis sama kiel kutime.



Asparagopsis taxiformis

En Nov-Zelando, la Instituto Cawthron esploras la uzadon de simila ruĝalgo (*Asparagopsis armata*) por nutri bovinojn. Oni eltrovis, ke tiu specio enhavas utilajn kemiaĵojn, kiuj reduktas tiujn mikrobojn, en bovinaj stomakoj, kiuj igas la bovinojn rukti kiam ili manĝas greson.

Alia kompanio evoluigas la utiligadon de invada specio de algo, nomita *Undaria*, kiu alvenis en Nov-Zelandon en la lastaj jaroj. La produkto estas nomata vakameo, *wakame* en la japana.



Asparagopsis armata



Boligita wakame (Undaria) por manĝi

Danĝeroj en la habitatoj de maralgoj

Invademaj longdornaj eĥinoj (*Diadema antillarum*, angle *sea urchins*) tradicie troviĝis ĉe la marbordo de Nov-Sudkimrujo. Dum la lastaj jardekoj, ili prosperis ĉe la orienta marbordo de Tasmanio, ekspluatante la marakvon plivarmiĝantan pro klimatŝanĝiĝo, kaj la manko de predantoj pro troa fiŝkaptado, por tro nutri sin per bedoj de laminarioj, tiel kreante "eĥinajn malfekundejojn" kie aliaj vivoformoj mankas. Nur grandaj fiŝoj (ekzemple *Chrysophrys auratus*, angle *Australasian snapper*) kaj palinuro (crayfish) kapablas manĝi la eĥinojn, pro ties dornoj.



Eĥino

Tamen la eĥinoj mem estas difekteblaj de alia efekto de klimatsanĝiĝo — mara acidiĝo pro la pliiĝanta sorbo de karbona dioksido — kio povas malhelpi ilin kaj aliajn marajn organismojn formi skeletojn.

Studas la aferon sciencistoj en la Aŭstralia Nacia Organizaĵo por Scienca kaj Industria Esplorado (CSIRO) kaj en la Instituto por Maraj kaj Antarktaj Studoj (IMAS) de la Universitato de Tasmanio.

Simile en Hauraki Gulf, Nov-Zelando, troviĝas eĥinaj malfekundejoj, kie abundas eĥinoj (*Evechinus chloroticus*, maorie *kina*) kaj mankas algoj, pelagaj fiŝoj kaj palinuroj. Aliflanke, en protektataj maraj rezervejoj, oni vidas multajn predantojn, ekzemple palinuroj kaj pelagaj fiŝoj.

Konkludo

La disvastigon de la emo manĝi algojn malhelpas al:

- sciomanko pri algoj kiel manĝaĵoj
- ŝanĝo de klimato
- maraj pestoj kaj malsanoj je algoj.

La Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo (FAO) aktive helpas establi industriojn por ekspluati algojn, kaj konsilas pri biosekureco. Tiaj industrioj multe kreskas nuntempe.

Multaj artikoloj indikas, ke ni devus

manĝi algojn pli ofte, pro iliaj sanigaj avantaĝoj. Diversaj algoj jam estas disponeblaj en butikoj en multaj landoj, do jam venis la tempo por konsideri manĝi algojn.

Glosaro

algo: alga

Asparagopsis taxiformis: red sea plume;
limu kohu (en la havaĵa lingvo)

biobrolaĵo: biofuel

Durvillaea antarctica: *rimurapa* (maorie);
bull kelp

eĥino: sea urchin

eĥina malfekundejo: urchin barrens —
submara “dezerto” kun tro da eĥinoj, ne
sufiĉe da algoj

Evechinus chloroticus: *kina* (maorie), eĥino
endemia en Nov-Zelando

Jasus edwardsii: palinuro, langusto:
southern rock lobster, crayfish, *kōura*
(maorie)

Pyropia columbina: southern laver,
karengo (maorie)

laminario: kelp

longdorna eĥino: long-spined sea urchin,
Diadema antillarum

makroalgoj: seaweeds

maralgo: seaweed

mikroalgoj, unuĉelaj algoj: unicellular
algae

musko: moss

norio: *nori* (japane) kolektiva nomo
de pluraj specioj de *Pyropia*, ruĝalgoj
manĝataj (sekigitaj, peklitaj aŭ kuiritaj)
en Eŭropo, Sudameriko kaj precipe
Sudorienta Azio

pelagaj fiŝoj: fiŝoj, kiuj loĝas en la pelaga
zono, nek proksime al la fundo nek
proksime al la surfaco de la maro

Undaria pinnatifida; vakameo: *wakame*

(japane), specio de brunalgo uzata en homa nutrado, precipe en Japanujo kaj en Koreujo

Referencoj

Marshall, M., *Kelp is coming: How seaweed could prevent catastrophic climate change*, New Scientist, May 2020.

en.wikipedia.org/wiki/Seaweed_farming

[cpb-ap-se2.wpmucdn.com/blogs.auckland.ac.nz/dist/1/140/files/2019/09/Karengo-](http://cpb-ap-se2.wpmucdn.com/blogs.auckland.ac.nz/dist/1/140/files/2019/09/Karengo-Research-Overview-final-12092019.pdf)

Research-Overview-final-12092019.pdf

www.fao.org/3/y4765e/y4765e0b.htm

Maralgoj por homa nutraĵo

[ore.exeter.ac.uk/repository/bitstream/handle/10871/31766/JAPH-D-17-0064R1%20](http://ore.exeter.ac.uk/repository/bitstream/handle/10871/31766/JAPH-D-17-0064R1%20Revised%20MS.pdf)

Revised%20MS.pdf Aborigenoj uzas algojn en Aŭstralio

www.highvaluenutrition.co.nz/2020/05/21/karengo-maori-led-research-into-the-health-benefits-of-edible-seaweed

news-oceanacidification-icc.org/2020/11/09/forecasting-impacts-of-ocean-acidification-on-sea-urchin-dominated-reefs

www.sciencedirect.com/science/article/pii/S0959652620308830 *Asparagopsis taxiformis* por bovinoj

www.stuff.co.nz/business/115458963/turning-sea-gorse-into-gourmet-export-product

www.stuff.co.nz/business/108803612/underwater-seaweed-forests-tipped-as-next-big-thing-in-climate-change-fight Foto de wakame (Undaria)

thefishsite.com/articles/fao-to-focus-on-seaweed-farming-biosecurity 4-minuta filmeto

Aŭstralia Hibrida Esperanto-Kongreso kaj Somerkursaro • 7–13 Januaro 2022



Esperanto-Domo Sidnejo
(143 Lawson St, Redfern NSW)
kaj rete, per **Zoom**

Kongresanoj en Sidnejo partoprenos iujn sesiojn ĉeeste, kaj aliajn, kune antaŭ granda ekrano. Ankaŭ okazos kunaj manĝoj kaj ekskurso. Ĉiu ekster-sidneja kongresano devos organizi sian propran tranoktadon. (AEA intencas publikigi liston de rekomendataj lokoj antaŭ Decembro.)

Kiam: vendredon, 7 Januaro (vespere) ĝis merkredo, 12 Januaro (vespere) + (nur ĉeeste) ĵaŭdon, 13 Januaro: vizito al la Muzeo de Nuntempa Arto (MCA) kaj Manly (per pramo)

Pri la informo (inkluzive de prezoj):
esperanto.org.au/kongreso


Spektu kaj lernu

Ĉu vi jam esploris la video-kanalon "*Esperanto Aŭstralia*" en YouTube (youtube.com/c/EsperantoAustralia)?

La 7an de Junio 2020 okazis la Aŭstralia Virtuala Unu-taga Kongreso, per Zoom. La unua preleganto estis Duncan Charters, prezidanto de la Universala Esperanto Asocio.

La prelego de D-ro Charters, kaj tiuj de ok aliaj, estis registrataj kaj alŝututataj al YouTube, kaj tiel lanĉiĝis la jutuba kanalo de AEA.

La 19an de Julio 2020 komenciĝis la ĉiumonata serio de prelegoj, ankaŭ per Zoom. Preskau ĉiu prelego estas nun spektebla.



FAMAJ TEMOJ EN ART-HISTORIO



Herkulo provas igi sian katon gluti pilolon.

Respondoj al la kvizo *Kiu estas?* (paĝo 4):

1 Ivo Lapenna **2** Louis Couturat **3** Vasilij Eroŝenko **4** René de Saussure **5** Julio Baghy
6 NITOBÉ Inazo **7** Leonard Newell **8** Marjorie Boulton **9** Katalin Kováts **10** Klara Zamenhof

KONTRIBUU

al

La limdato por la
venonta numero estas la
15a de aŭgusto. Sendu
artikolojn, rakontojn,
enigmojn, receptojn,
fotojn ktp al
esk@esperanto.org.au -
ni bezonas vin!



ESPERANTO

sub la suda kruco

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Ivan Pivac | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Bradley McDonald

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@gmail.com
0800 350 781

What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has almost 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

